

Redakcia noto: 100-jara Grzimek, 200-jara Darwin

Por rapidigi investojn (dum la nuna financkrizo) iu bavara ministro volas estonte limigi la naturprotektadon: temporabaj medioakordiĝemaj ekzamenoj por malkovri ekzistodanĝerojn por bestoj kaj plantoj invitus al misuzo. Ĉiu ajn ja povus – per “ne certigitaj pretendoj pri la ekzisto aŭ endanĝerigo de malofta specio” – bloki la celatajn investojn por vivteni la trafikon kaj la aŭtomobil-industrion, kaj unu el la tiucele de naturprotektantoj “preferata fantom-besto” ekzemple estus la malgranda “tre timema kaj sinretenema muskardeno”.

Jes, la muskardeno estas nur malgranda besto. Sed la bavara minist-raro eble rigardu ĉirkaŭen, kion faras la homo kun pli grandaj bestoj kaj viv-regionoj, kaj kial la homo ne forgesu investi por la protektado de nia vivo-medio: sufiĉe bone videblas la sekvoj de la klimatoŝanĝiĝado kaŭzita de la homo:

<p><u>en Arкто</u></p> <ul style="list-style-type: none"> - ŝrumpado de glacibaroj, bankizoj kaj glaĉeroj <p><u>en Eŭropaj maroj</u></p> <ul style="list-style-type: none"> - marnivelo plialtiĝas - akvotemperaturoj plialtiĝas - vivaĵspecioj retiriĝas norddirekte - fiŝaro endanĝerigita <p><u>en nordokcidenta Eŭropo</u></p> <ul style="list-style-type: none"> - pli fortaj pluvoj dumvintraj - plialtiĝo de la danĝero pro inundoj riveraj kaj marbordaj <p><u>en Mediteraneaj regionoj</u></p> <ul style="list-style-type: none"> - malpli da atmosferaj precipitaĵoj - plialtiĝo de danĝero de arbar-incendioj - malabundaj rikoltoj - pli da mortintoj pro varmego - endanĝerigo de speciomulteco 	<p><u>en norda Eŭropo</u></p> <ul style="list-style-type: none"> - malpli da neĝo kaj glacio - plialtiĝo de inundodanĝero - pli longaj kreskadoperiodoj - malpli da energikonsumado dum hejtperiodoj - pli da dumvintraj ŝtormdanĝeroj <p><u>en centra kaj orienta Eŭropo</u></p> <ul style="list-style-type: none"> - temperaturaj ekstremoj - malpli da someraj precipitaĵoj - dumvintra inundodanĝero - plimultiĝo de arbar-incendioj - pli multspeca agrara kulturado <p><u>en montaraj regionoj</u></p> <ul style="list-style-type: none"> - temperatura plialtiĝo - glaĉera fandiĝado - malpli da permfrostregionoj - pli da terdeglitoj kaj erozioj - alta risko, ke specioj formortu
--	---

Antaŭ 200 jaroj naskiĝis *Charles Darwin* kaj antaŭ 100 jaroj naskiĝis *Bernhard Grzimek* – du homoj, kiuj dediĉis sian vivon al la scienco kun “Respekto antaŭ la vivo”. Ankaŭ politikistoj ekkonu, ke ilia rolo en publiko kiel demokratiaj reprezentantoj estu zorgi kun respekto antaŭ la vivo pri nia medio, kiu estas nepre necesa por homa pluvivado.

-sa

Originalaj artikoloj**2009 – la Jaro de la Gorilo**

Rüdiger SACHS

Enkonduko

Dum renkontiĝo en *Kobe*, Japanujo, je la 15-a de oktobro 2009, d-ro *OSAMU Ishikawa*, veterinaro kaj zoodirektoro de la urba “*Oji Zoo*”, montris al mi kaj la min akompananta grupo de esperantistoj la specialan ekspozicion pro la nuna “Jaro de la Gorilo”. Mi ne havis konon pri tiu ĉi mondovasta evento. Ĉu pri tio sciis la poŝtministrejoj oficistoj en Germanujo? Mi dubas. Sed ili elektis el la proponoj por



poŝtmark-eldono omaĝe al la nuna centjariĝo de la fama naturprotektanto *Bernhard Grzimek* ĝuste la dezajnon “televi-dprofesoro kun gorilo”! Kia koincido!

Bildo 1: Ekzakte je la Ĝjimeka naskiĝdatreveno, la 24-a de aprilo 2009, aperis tiu ĉi poŝtmarko de la germana poŝtministerio memore de lia centjariĝo.

Reen al la japanuja “*Oji Zoo*”. En bona etoso mi lernis multon pri goriloj kaj la minacoj al tiu besto, pri kiuj suferas ankaŭ aliaj grandaj simioj kaj sovaĝejaj primatospecioj. En la sekva teksto mi provas kunmeti la fakajn informojn kaj prigorilajn klarigojn de mia japana veterinarokolego.

Specio endanĝerigita de forpereo

La grandaj nehomaj primatoj, kaj precipe la plej altstatura el ili, la gorilo, jam ĉiam estis bazo de inspiro kaj fascino por homoj. Ĝia proksima rilato al la homo iel elstarigas kaj apartigas ĝin el nia ideo pri “bestomondo”. Genetikaj analizoj montris, ke la goriloj kaj homoj dividas 98,4% de siaj genoj. Goriloj posedas memzorgadon, rimark-eblan inteligentecon kaj la eblon komuniki per signoj kaj simboloj, same kiel ili kapablas celkonscie uzi certajn bazajn ilojn. La hom-similaj bestoj eligas emociojn kiel ĝojo kaj malĝojo simile al homoj.

Multaj minacoj endanĝerigas la vivon de goriloj. Same kiel por la aliaj grandaj nehomaj primatoj la plej grava danĝero estas la perdo de sia natura vivospaco kaj (krom malsanoj kaj la efikoj de lokaj armilaj konfliktoj) la ĉasado por la loka “boskoviando-merkato”, t.e. la neleĝa negocado de indiĝenoj per viando de sovaĝaj animaloj “el la sovaĝ-bosko” (plej ofte la predo de ŝtelĉasistoj) por vendo kiel homa nutrado. Kelkaj gorilopopulacioj estas sub zorgaj konservadoprogramoj kaj restarigklopodoj. Entute tamen la gorilo estas endanĝerigita specio kaj suferas pro gravaj minacoj. Fakte ĉiuj grandprimataj specioj en Afriko – bonobo, ĉimpanzo kaj gorilo, same kiel la sudorientazia orangutano – estas laŭnombre krute malkreskaj kaj ilia perdo kvoto preskaŭ ĉie plialtiĝas.

La konservado de sovaĝejaj gorilopopulacioj en danĝero de forpereo prezentas malfacilan taskon por la homaro. Ne nur ĉar tiu specio estas la plej homparenca: ĝi ankaŭ estas ŝlosila specio kadre de la ekologio en sia pluvbarbara habitato, kiu reguligas la tutmondan klimaton. Malsukceso savi la gorilojn de forpereo estus neriparebla perdo kaj malprospera antaŭsigno por la homa estontecperspektivo ĝenerale. Urĝas sukcesaj konservadoklopodoj, ĉar la tendenco sugestas, ke ĉiuj grandprimataj specioj povus malaperi de nia Tero en la nuna 21-a jarcento – kaj kelkaj eĉ post paso de nur kelkaj jardekoj. Novaj aliroj estas bezonataj por inversigi tiajn malbonajn postviv-ŝancojn.

Proksima rigardo al goriloj


Nia kompreno de goriloj multe plialtiĝis dum la pasintaj kvar jardekoj. La sekvaj specioj kaj subspecioj estas tiuj, kiujn la plej multaj fakuloj agnoskas:

Genro	specio	subspecio	sciencia nomo	numero de individuoj
Gorilo			<i>Gorilla</i>	
	Okcidenta gorilo		<i>Gorilla gorilla</i>	
		okcidenta malalt-ebena gorilo	<i>Gorilla gorilla gorilla</i>	ĉ. 200 000
		krucrivera gorilo	<i>Gorilla gorilla diehli</i>	250 – 300
	Orienta gorilo		<i>Gorilla beringei</i>	
		montogorilo	<i>Gorilla beringei beringei</i>	650 – 700
		orienta malalt-ebena gorilo	<i>Gorilla beringei graueri</i>	5 000 – 10 000

Tabelo 1: La gorilaj specioj kaj subspecioj

Sciencistoj eniris la gorilan vivospacon kaj malkovris ilian socian kompleksecon kaj ĉefan rolon en la ekologio de ilia habitato. Ekzistas 4 ĝenerale akceptitaj gorilaj subspecioj, apartenantaj al 2 specioj. Primatologoj daŭrigas esplori la rilaton inter diversaj gorilopopulacioj.

Nuntempe troviĝas naturaj gorilopopulacioj en 10 landoj, inter ili Angolo, Niĝerio, Centrafriko, Ruando kaj Kongo. Laŭ plej kredeblaj taksadoj la tutmonda gorilopopulacio konsistas el ĉ. 200 000 individuoj. Tiuspecaj enketoj ĝenerale okazas surbaze de nombrado de nestoj aŭ dormlokoj. Laŭ la ruĝa listo de IUCN de 2008, ĉiuj gorilaj taksonoj estas markitaj “endanĝeritaj” aŭ “krite endanĝeritaj”.



Kiel protekti gorilojn?

La Konvencio pri konservado de migradaj specioj de sovaĝaj bestoj (CMS) kaj aliaj organizaĵoj intertraktas pri novaj laŭleĝaj interligoj pri gorilokonservado inter la ŝtatoj, en kiuj vivas gorilopopulacioj.

Bildo 2: Eĉ specialan permeson nia esperantista vizitanto grupo en *Kobe Uji Zoo* ricevis vidi – en izolita vartejo – 6-monataĝan orangutanon bebon, kies patrino ne kapablis nutri ĝin, lasante la idan prizorgon al homa “mamnurist(in)o”. Ĝi estas masklo kaj nomiĝas “MuMu” – laŭ decido de la publiko de *Kobe*. (Fotis: R. Sachs)

Oni esperas, ke la agadoj en tiu ĉi “Jaro de la gorilo” helpas peri al pli granda publiko la scion kaj konscion pri la problemo. Necesas protekti la arbaron kaj gorilajn ekosistemojn kaj kontraŭbatali la ŝtelĉasadon. Sed ankaŭ la subteno de aliaj evoluprojektoj ĉirkaŭ la gorilaj hejmaj habitatoj kaj limigita gorilo-turismo povas helpi protekti la lastajn vivejojn de la endanĝerigita specio.

Adreso de la aŭtoro

Prof. Dr. Rüdiger SACHS
Vor dem Brückentor 3
DE – 37269 – Eschwege/GERMANIO
<isaesachs@aol.com>

Priaŭtora informo

Veterinaro, parazitologo. Laboris en la serengetia *Michael-Grzimek*-Memorlaboratorio de 1963 ĝis 1967